


La brulanta kastelo



Leopold Vermeiren

Flandra Esperanto-Ligo



La brulanta kastelo

La brulanta kastelo

Leopold Vermeiren

Tradukis Ivo Durwael

La brulanta kastelo

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi e-libro rajtas esti libere kopiita.

PROLOGO

Eble vi scias, ke antaŭ centoj da jaroj, en la epoko de la Kavaliroj, vivis riĉaj kaj potencaj nobeloj, kiuj vivis en fortikaj kasteloj. Ĉirkaŭ la kasteloj troviĝis la argilaj kabanoj de servutuloj kaj sklavoj, kiuj devis labori por siaj mastroj.

La sinjoroj, la nobeloj kaj la kavaliroj mem ne faris manlaborojn. Ili ĉasis kaj ekzercis la manipuladon de la armiloj. Ilia preferata okupo estis militiri. Ataki estis ilia ĉefa okupo.

En tiu epoko vivis Johano, juna servutulo de sinjoro Uroldo.

Johano mem naskiĝis kiel filo de kavaliro en la kastelo "Rabobirda Nesto". Sed post sieĝado, potenca sinjoro invadis ĝin kun siaj militistoj kaj detruis ĝin. La kastelestro kaj multaj el liaj disĉiploj estis mortigitaj. La aliaj estis malliberigitaj.

Oni kunportis la malgrandan Johanon kaj edukis lin kiel servutulon. Ĉar li estis tro malgranda en la momento de la forporto, li nenion memoris pri la patra kastelo. Li pensis, ke li naskiĝis kiel filo de servutulo. Plurfoje oni vendis lin al alia kastelestro.

Johano fariĝis forta plenkreskulo. Iun tagon, li sukcesis fuĝi de sia mastro kaj kaŝis sin en la arbarego Dagono. Tie li nomis sin mem kavaliro. Li ekportis ruĝajn kirason kaj mantelon. Tial amikoj kaj malamikoj nomis lin la Ruĝan Kavaliron. Lia devizo estis:

Subteni malriĉulojn

Liberigi subpremitojn

Helpi suferantojn.

1. La reĝo kaj la turniro

1. La Verda Kavaliro

Tiu ĉi ĉapitro ne troviĝas en la provversio de la libro, sed nur en la plena versio, kiun oni povas akiri ĉe www.retbutiko.be

2. Kaptita

Tiu ĉi ĉapitro ne troviĝas en la provversio de la libro, sed nur en la plena versio, kiun oni povas akiri ĉe www.retbutiko.be.

2. Kvin kontraŭ unu

La Ruĝa Kavaliro kaj Konrado, lia paĝio, sidis en kaverno sur kruda ligna benko kaj reveme rigardis la flamojn de la fajro. Estis ankoraŭ frumatene dum aŭtuna tago. Subite aŭdiĝis la batoj de hufoferoj de galopanta ĉevalo. Konrado dubis.

- Mastro, ĉu aŭdiĝas io?

- Jes, kavaliro alproksimiĝas, respondis Johano. Kiu povus esti tiel frue en la mateno?

Li prenis sagon, fiksas ĝin sur la ŝnuro de sia arko kaj iris eksteren. La suno ne plu brilis forte. Tamen ĝi glitis inter la folioj kaj trunkoj de la arboj kaj tiel kreis centojn da helaj kaj malhelaj strioj en la vekiĝanta arbaro.

- Jen, inter la arboj, mastro...

Tute malproksime vidiĝis brilanta kasko de kavaliro, kiu trankvile alproksimiĝis.

- Kiu li povus esti? demandis Konrado. Mi pensas, ke li estas amiko, ĉar li estas tute sola...

- Ho... Li estas sinjoro Uroldo! subite vokis Johano. Rigardu, li jam svingas la manon.

* * *

- Saluton, Konrado, Johano! Kiel vi fartas?...

Kaj Uroldo saltis de sia vaporanta ĉevalo.

- Ni fartas tre bone, sinjoro Uroldo. Kia plezuro vidi vin! Nu, Konrado, ĵetu kovrilon sur Plutonon...

- Mi ankoraŭ volas viziti vin antaŭ ol la vintro estas en la lando, Johano.

Brrr... Malvarmas tiel frue en la arbarego.

- Varmiĝu ĉe nia fajro. Eniru, tiam ni povos plu babili. Vi ja restos ĉi tie hodiaŭ, ĉu ne?

- Jes, ĉi tiun tagon mi volas pasigi kun fidelaj amikoj.

- Tion ni festu, ridis la Ruĝa Kavaliro... Jen, botelo da malnova vino el la kelo de la grafo mem... Salmo el la rivero kaj ... Damne, Konrado, ni ja ankoraŭ nenion ĉasis.

- Efektive, kaj la lastan viandopecon ni manĝis hieraŭ vespere.

- Konrado, estu viandaĵo sur nia tablo! Atentu, hieraŭ mi trovis spuron. En unu horo mi alportos kapreolon por rosti.

- Kapreolon en tiu ĉi sezono?

- Mi volas veti por mia vivo, Uroldo, kaj mi bezonos eĉ ne unu horon!

La Ruĝa Kavaliro jam estis forlasinta la kavernon, kaj momenton poste Jago galopis sur monta vojeto en la arbarego.

* * *

Kvin altkreskaj kavaliroj en brilaj vestaĵoj rajdis babilante en la mateno. Gerardo de Arbarejo troviĝis en la mezo kaj ŝajne regis la konversacion.

- Ni nur revenos al nia kastelo, kiam la nukoj de niaj ĉevaloj estos kovritaj per ĉasaĵoj, li fanfaronis. La arbarego Dagono havas multe da sovaĝaj bestoj kaj la tago estas longa.

- Kiun direkton ni sekvu, sinjoro?

- Ni prenu la vojeton dekstren en la direkto al la akvofonto.

La vojeto mallarĝiĝis kaj la kavaliroj devis sekvi unu la alian en longa vico. La branĉoj pendis malalte kaj inter la folioj videblis malfortaj sunradioj. La kavaliroj silentis. Ili spuris dekstre kaj maldekstre inter la arbotrunkoj kaj inter la arbustoj. Malproksime aŭdiĝis la akvo de la fonto.

Tiam la unua kavaliro haltis kaj flustris:

- Sinjoro de Arbarejo, rigardu la kapreolon, kiu trinkas tie.

- Kie? Kio? Tio estos mia trofeo... Atentu, ni ĉasu ĝin.

Ili progresis paŝrapide kaj kontraŭ la vento, ĝis la distanco permesis bonŝance uzi sagon kaj pafarkon. Bela ĉasaĵo! La kapreolo staris kun la antaŭaj piedoj en la akvo kaj sensoifigis sin per sorbado.

- Donu al mi sagon, Baldo, diris sinjoro Gerardo.

Iu transdonis sagon kaj la grandulo streĉis la arkon.

- Restu senmova Ozo, li diris al sia ĉevalo.

Lia forta brako streĉis la ŝnuron kaj li celis.

- Jen...

Senmove, li retenis sian sagon en sia mano. Tamen la kapreolo estis falinta.

- Mastro! Mastro! Ĝi estas trafita!

- Kiu kuraĝis pafi antaŭ mi? kriegis Gerardo, sed lia voĉo ekmutis, kiam li rimarkis la surprizitajn vizaĝojn de siaj amikoj.

Neniu el ili havis arkon en la mano.

- Rigardu, sinjoro... tie rajdanto venas el la arbaro.

- Li saltas de sia ĉevalo kaj genuiĝas ĉe la kapreolo...

- Ĉiele... li estas...

- Kiu li estas?

- Li estas la Ruĝa Kavaliro!

Gerardo de Arbarejo ruĝiĝis pro kolero.

- Kiu? La Ruĝa Kavaliro? Ha, ha, ha! Nun li pagos por tiu turniro. Rapidu sinjoroj, ke li ne eskapu de ni ĉi-foje. Ek, ataku!

Kaj galopante ili sturmis sur la arbara vojo en la direkto al la kapreolo.

* * *

La Ruĝa Kavaliro kliniĝis super la falinta besto. La sago trafis ĝin meze en la brusto.

- Kia bela kapreolo, murmuris Johano. Ni manĝos tutan semajnon de ĝi. Jago, alproksimiĝu, por ke mi povu meti la kaptajon sur vian dorson.

Ĝuste kiam li volis rektiĝi, li aŭdis la alkurantajn ĉevalojn. Rapidege Johano rigardis.

- Haltu, viro. Kiu vi estas? aŭdiĝis malafabla voĉo.

- Tio ne koncernas vin... Cetere, kiel li nomiĝas? Jen, sinjoro Gerardo de Arbarejo! Nun mi rekonas vin! Sed tiu ne ŝatis babiladi nun.

- Haha, finfine vi estos nia viktimo! Ataku lin, amikoj, li vivis sian lastan tagon! li kriis.

La Ruĝa Kavaliro estis en embarasega situacio. La kvin kavaliroj encirkligis lin. Li staris apud sia ĉevalo. Rapide li elingigis sian glavon kaj repuŝis la unuan atakon de iu kavaliro. Sed Johano ne povus rezisti al tia superforto. Per saltego, kaj antaŭ la atako de du aliaj kavaliroj, li plonĝis trans la kapreolon en la akvon kaj vadis de la akvobordo.

- Venu, Jago, venu rapide!...

La ĉevaloj de la kavaliroj iom hezitis, sed tio sufiĉis por Jago. Ĝi jam estis apud sia mastro kaj momenton poste Johano jam troviĝis sur la selo.

- Hej ho!... Hej ho!... Hej ho!...

Tiu batakrion sonis alte kaj laŭte kiel alarmo trans la lageto kaj aŭdiĝis profunde en la arbaro. Hej ho!... Jago saltis sur mallarĝan terlangon.

- Ataku! Li eskapos de ni! kriis kavaliro, kies ĉevalo staris ĝisgenue en la akvo.

Minace li alte levis sian glavon, sed Johano rapide sin ŝirmis kontraŭ la atako. Lia glavo fulmis tra la aero, kaj unu momenton poste la atakanto falis de sia prancanta ĉevalo kun frakasita ŝultro. Sinjoro Gerardo blasfemis kaj kriaĉis kun ŝaŭmo sur la buŝo.

- Diable! Ne baru la vojon unu al la alia! Malantaŭen. Ni ataku kune, samtempe.

Sed Johano saltis antaŭen kaj ne lasis al ili tempon por regroupiĝi. Lia glavo denove leviĝis ... kaj jam dua kavaliro estis grave vundita kaj falis teren. Lia ĉevalo eskapis de sub la vundito kaj forkuris ĝis la arbarorando, kie ĝi haltis henante.

- Hej ho!!!

Tio sonis kiel venkokrio. Tamen la atako estis duoble danĝera por la Ruĝa Kavaliro. Li estis ĉirkaŭite de malamikoj kaj nur tre pene li povis rebati iliajn ardajn atakojn. Lia ŝanco malaperis. Se li estus restinta ĉe la akvo lia situacio estus pli sekura. Tie li devis defendi sin nur je unu flanko. Nun li estis vundebla de ĉiuj flankoj.

- Hej ho!... Hej ho!... Hej ho!...

* * *

Konrado kaj Sinjoro Uroldo estis ĉe la fajro. Regis silento en la kaverno. Neniu diris unu vorton. Aŭdiĝis nur la kraketado de la fajro.

- Hej ho!!!...

- Aŭdu! diris Konrado. Mia mastro jam revenas. Sed ne... trifoja ripeto de ĉi tiu krio signifas, ke al li minacas danĝero!

- Kio okazas?!

- Mi ne scias.

Ili kuris al la ĉevaloj kaj tuj poste ekgalopis tra la arbaro.

- Aŭdu, sinjoro Uroldo, la krio ripetiĝas. Mi esperas, ke ni alvenos ĝustatempe.

- Kial ni permesis al Johano por foriri sola.

Ili premegis la spronojn en la flankoj de siaj ĉevaloj. Tiuj pafiĝis antaŭen kiel sagoj sur la mallarĝa arbarvoĵeto.

- Jen!... Tie!

Inter la trunkoj de la arboj ili vidis malproksime, en la ĉirkaŭaĵo de la lago, sian amikon ĉirkaŭita per tri kavaliroj.

- Li kuraĝe defendas sin, ridis Uroldo. Rapidu Konrado, ĉar la batalo baldaŭ decidiĝos.

Ili atingis fulmrapide la arbarorandon.

- Rigardu, jam du atakintoj troviĝas en la sablo. Tie...

Sed Uroldo retenis la spiron. Li vidis kiel unu el la falintoj reprenis sian glavon en la manon kaj rampis al la ĉevalo de Johano.

- Johano! Atentu!

Uroldo kriis, sed Johano ne aŭdis lin. Kiel eble plej rapide Uroldo prenis siajn arkon kaj sagon kaj celis. La helpo estis nepre necesa. La vundito jam estis apud Johano.

- Por vi, kriegis Uroldo...

Li vidis kiel la rampanta kavaliro ekhurlis kaj kurbiĝis antaŭen. La sago estis trafinta lin en lian dekstran brakon. Lia glavo falis apud li sur la teron.

- Hej ho! Hej ho! Helpu Konrado!

Laŭte kriegantaj, per levita glavo, la du amikoj alsturmis al la batalanta grupeto. La Ruĝa Kavaliro alridis ilin, kiam ili estis proksimaj.

- Jen, sinjoro Gerardo... nun ni estas tri kontraŭ tri, nun montru kion vi valoras.

Kaj per forta bato Johano eligis lian glavon el lia mano. Sinjoro Gerardo paliĝis. Lia ĉevalo flankensaltis tri, kvar paŝojn. Tiam Gerardo rigardis malantaŭen.

- Kio... Sinjoro Uroldo? Ĉu vi helpas la Ruĝan Kavaliron? li raŭke kriis, ruĝa pro kolero.

- Reprenu vian glavon kaj batalu, hurlis Johano.

Sed tiu incito estis vana. Sinjoro Gerardo spronis sian ĉevalon kaj liaj du amikoj prenis saĝan decidon, kiam ili fuĝe postsekvis lin.

- Ĉu ni postkuru ilin? demandis Konrado.

- Lasu tion, tiaj malkuraĝuloj ne meritas nian atenton, malestime reagis la Ruĝa Kavaliro. Nun ni helpas al la vunditoj por resalti sur siajn ĉevalojn kaj ni laŭeble flegos ilin... Pri ilia sorto ni decidus poste.

Al la Ruĝa Kavaliro mankis spiro. Ŝvito gutis de lia vizaĝo kaj lia mano estis sangoplena.

- Dankon, sinjoro Uroldo, li diris. Vi alvenis ĝustatempe.

- Ĉu vi vidis la vizaĝon de tiu viro?

- Jes, li estas Gerardo de Arbarejo. Sed ni ne parolaĉu pri la okazintaĵoj. Ni kunportu la kapreolon. Rostita ĝi ege bongustos. Mi terure malsatas pro ĉio tio. Ek, Jago, ek...

3. La brulanta kastelo

1. La bruligantoj

- Kunuloj, diris sinjoro Gerardo de Arbarejo dum li leviĝis el sia alta apogseĝo, vi ĉiuj scias kiel sinjoro Uroldo insultis min hieraŭ. Li defendis la Ruĝan Kavaliron, sklavon, proskribitulon, kiu volas ridindigi nin kavalirojn, kaj kiu incitas la popolon al ribelado. Nia grafo, tro maljuna kaj tro bonvola, ne volas interveni. Tial do mi mem venĝos min!

- Prave!

- Hura! Vivu sinjoro Gerardo, kriis la aliaj, ni subtenos vin. Vi nur ordonu al ni, ni sekvos vin.

La granda forta, sed malĝentila viro provis rideti.

- Tio estas vira lingvo, amikoj. Morgaŭ, dum la nokto estos nia tempo por venĝi. Levu la pokalojn je nia venko. Sanon, amikoj, sanon!

La venontan nokton...

Dek kurbitaj estaĵoj kaŝiris inter la arbustoj. Estis tute senlume. Post po du paŝoj, la viroj haltis kaj atente ĉirkaŭrigardis. Neniu estaĵo videblis. Sude, la arboj kaj arbustoj limis ĉe la larĝa fosaĵo ĉirkaŭ la kastelo de sinjoro Uroldo. Singarde, paŝon post paŝo, la ombroj atingis ĝian randon. Baldo, la ĉefo, mansignis kaj la aliaj faligis sin. Eĉ je unu metro oni tute ne povus vidi ilin, tiel bone ili kaŝiĝis inter la densaj arbustoj. Baldo atendis longe, ĝis la gardisto sur la kastela muro estos preterpisinta. Li sciis, ke tiu revenis nur ĉiun dekan minuton. Post signalo de la ĉefo, kvar viroj glitis suben ĉe la fosaĵrando ĝis inter la kanoj. Henso, la plej malgranda, senbrue naĝis al la transa flanko.

- Preta. Ĵetu la ŝnuron.

Baldo ĵetis ĝin. Henso kaptis ĝin kaj ligis ĝin ĉirkaŭ arbotrunko. Poste la tri viroj sinsekve rampis laŭ la ŝnuro trans la akvon. Poste Henso fajfis, laŭte kaj akre kvazaŭ nokta birdo. Unu el la konspirantoj, kiu kaŝis sin en

la arbustoj, trankvile rektiĝis. Li estis tre granda. Li povintus esti sinjoro Gerardo mem. En lia dekstra mano, li tenis rulitan ŝnuron, ĉe kies fino troviĝis fera hoko. La grandulo fiksrigardis la altan muron antaŭ si dum iom da tempo, poste svingis siajn brakojn kaj torson malantaŭen kaj komencis balanciĝi kun iom klinitaj kruroj. Subite, post forta kirla gesto, li ĵetis la ŝnuron supren. Dume la ŝnuro malvolviĝis. La viro ja firmtenis ĝian finaĵon en la mano. Krake, la hoko falis sur la muron. La grandulo ĵetiĝis teren kaj atendis. Okazis nenio. Neniu rimarkis ion. Malrapide, la viro tiris la ŝnuron ĝis la hoko ie fiksiĝis ĉe ŝtono de la krenela mursupro. La ŝnuro streĉiĝis kaj la grandulo pendolis al la alia flanko de la fosaĵo.

- La hoko bone fiksiĝis, ĉefo.

- Henso, vi kiel unua rapidu supren.

Kiel simio, la etulo rampis supren sur la kastela muro. Sur la parapeto neniu videblis. Post iom da tempo, Barto kaj liaj kunuloj jam estis apud li. Kune ili ŝteliris suben per la ŝtuparo. Tie troviĝis la kastela placo.

- Tie troviĝas la remizoj...

- Ili estas plenplenaj da fojno kaj pajlo.

- Henso, rapide bruligu ĉion.

- De kie venas la vento?

- De la sudo. Ni atendos vin ĉe la kastela pordego. Ĉu konsentite?

Henso malaperis kaj rapide li sukcesis bruligi fojnon per siaj silikoj. La fajro rapidege disvastiĝis. Baldaŭ la tuta fojn- kaj pajloamaso estis en flamoj.

* * *

La Ruĝa Kavaliro kaj Konrado trotis al sia kaŝejo sur la serpentumanta arbarvoĵeto. Estis jam malfrue kaj ĉevaloj kaj rajdantoj lacis. Sub la arboj estis ege mallume. Nur tra la foliaro flagris kelkaj steloj.

- Nia lito estos dolĉa kaj bonfartiga, murmuris la Ruĝa Kavaliro.

Hodiaŭ ili rajdis longan distancon. Konrado nur kapjesis. La konversacio haltis. Tiam ili rimarkis ruĝan ardaĵon super la arboj je la orienta flanko. Johano haltigis sian beston. La ĉevaloj henis maltrankvile.

- Konrado, la arbaro brulas. Rigardu, kia ruĝa lumo!

Ili spronis siajn lacajn ĉevalojn kaj rajdis sur altaĵon, kie ili facile povos spekti la ĉirkaŭaĵon. Konrado kiel unua atingis la pinton.

- Mastro... Mastro... La kastelo brulas! Kia fajro... kia incendio....

- La kastelo de sinjoro Uroldo?

- Jes...

- Damne...

Nun ili ambaŭ vidis kiel la kastelo brulas kiel torĉo. La turo aspektis kiel flamkolono kaj la fumo, ruĝe kolorita per la flamoj, leviĝis dense norden.

- Rapidu, Konrado, ni helpu tie.

La laceco jam estis forgesita. Ili kiel eble plej rapide malsuprenrajdis al la rivero kaj feliĉe trovis boaton por atingi la transan bordon. Ili fiksis la ĉevalojn en sekura loko kaj poste ili kuris al la kastela korto, kie dekoj da homoj senorde diskuris kun eskaloj, siteloj, potoj, kaldronoj kaj tiel plu... Ili kriis kaj veadis kiel frenezuloj. La remizo kaj la turo ŝajnis grandegaj torĉoj. Dekoj da siteloj kun akvo senĉese ĵetiĝis per nelacigeblaj estingantoj. Sed la efiko estis kiel guto en dezerto. La akvo jam ekvaporiĝis antaŭ ol ĝi tuŝis la brulaĵojn. Kiam la vento blovis en la direkto de la korto, la varmego estis neeltenebla. La servistoj, ŝvitantaj, kun malorda hararo kaj malsekaj vestaĵoj, ekstreme penadis por savi ion. Per unu rigardo, la Ruĝa Kavaliro taksis la situacion. La remizo kaj la turo estis nesaveblaj. La vento blovis el la sudo. La risko estis granda, ke ankaŭ la norda alo ekbrulos. Johano saltis sur fenestrobreton kaj metis la manojn kiel funelo antaŭ sian buŝon.

- Lasu la remizon. Tio estas perdita energio.

- Ĵetu akvon sur la konstruaĵojn de la norda alo! La fajro ne havu eblecon

por bruli tie, se ne la tuto estos perdita.

- Konrado, kunvoku dek homojn por ŝirmi la sudan alon.

La Ruĝa Kavaliro kriis per alta kaj akra voĉo, pli laŭte ol la krakado de la brulanta ligno. Unue li helpis ĉe la pinto de la vico por ĉerpi akvon, poste li laŭiris la vicon kaj ordonis al la viroj por pliproksimiĝi kaj pliefikigi la ĉenalportadon. Oni levis grandajn kaldronojn da akvo kaj verŝis ilin sur la tegmenton de la norda alo.

- La remizo disfalas!

Kun tondra krako la trabaro falis teren, kaj milionoj da fajreroj disĵetiĝis al la aliaj konstruaĵoj.

- Sinjoro Johano, la gardejo brulas!

Sed tiu alarmo estis nenecesa. Konrado gardis ĝin. Kiam la Ruĝa Kavaliro alvenis tie, li vidis nur peceton da brulanta ligno formortanta en akvogutoj.

- Atentu. For de la ligna turo! La tegmento falas!

Kvindek homoj baraktis kontraŭ la fajro. Kvindek homoj batalis por pluekzisti. Kvindek homoj batalis por sia mastro. Sinjoro Uroldo estis la plej bona mastro en la regiono kaj ĉiu el liaj servistoj volus oferi sian vivon por li.

- Pli rapide!

- Pli da akvo!!...

Ankaŭ Johano faris sian eblon. Vere, iam Uroldo estis lia malbona mastro, lia malamiko. Sed nun li estis fariĝinta lia plej fidela amiko. Por tiu viro volonte li oferus sian vivon. Sed... kie estis sinjoro Uroldo? La tutan tempon Johano ne estis vidinta lin. Nun, kiam la fajro iom malpliĝis, subite li pensis pri li.

- Hej, Heribaldo, kie estas via mastro?

- Sinjoro Johano, mi ne scias.
- Hej, sinjorino, kie estas la mastro?
- Ruĝa Kavaliro, mi ne scias.
- Hejno, ĉu vi vidis sinjoron Uroldo? Kie li estas?

La demando kuris de unu persono al la alia kiel fajro en fojnoamaso, dum la siteloj transdoniĝis.

- Sinjoro Uroldo... Sinjoro Uroldo... Kie li estas? Kiu vidis lin antaŭ nelonge?... Kie li estas?

Sed neniuj povis respondi. Subite la turgardisto enkuris la kastelon kaj portis sur siaj ŝultroj grave vunditan homon.

- Jen, diris la soldato, fremdulo, kiu volis fuĝi tra la arbustaro. Sed mia sago malhelpis lian forkuron.

Oni metis la viron sur la teron de la korto. Pro la flamoj li estis bone videbla. Kiam la Ruĝa Kavaliro rigardis lin, rekona signalo fulmis en lia kapo.

- Sed, viro, mi jam vidis vin pli frue. Vi estas la paĝio de sinjoro Gerardo de Arbarejo...

La vundito volis nei tion, sed ankaŭ Konrado rekonis lin.

- Jes, ankaŭ mi vidis vin en la pasinta semajno ĉe sinjoro Gerardo.
- Indulgon!... Indulgon!...
- Ha!... do vi bruligis la remizon...

La viro terure suferis pro doloro. La sago de la gardisto estis trafinta lian dekstran pulmon. Jam preskaŭ mortanta li ne volis nei sian kulpon.

- Jes, li murmuretis, Dio benu min, ni bruligis la remizon kaj kunprenis sinjoron Uroldo. Indulgu min!...

- Ve, vi malbenito!... ekkriegis Johano.

Sed la viro jam ne plu aŭdis tion. Lia kapo turniĝis flanken. Rigardante la flamojn, kiujn li mem estis ekbruligintaj, li foriris al la eterneco.

La krepusko anonciĝis en la ĉielo. La flamoj eklacis. Dank' al la forta volo de tiom da homoj kaj la akvo, la fajro estis venkita. Kaj tamen la homoj ne jubilis kiam la lasta fajrero estis estingita. Al ili mankis ilia mastro...

- Sinjoro Johano, reportu nian mastron, ili petegis.

- Amikoj, diris Johano, sinjoro Uroldo revenos, tion mi promesas. Ĉiu el vi faru sian laboron kiel antaŭe. Rakontu al neniu pri mia promeso. Diversaj homoj intencis demandi ion, sed la Ruĝa Kavaliro ne donis eblecon. Kune kun Konrado, li fulmrapide forlasis la korton kaj malaperis tra la kastela pordego.

2. La ublieto

Tiu ĉi ĉapitro ne troviĝas en la provversio de la libro, sed nur en la plena versio, kiun oni povas akiri ĉe www.retbutiko.be

Kolofono

Titolo: La brulanta kastelo

Aŭtoro: Leopold Vermeiren

Tradukis: Ivo Durwael

Ilustris: J. de Simpele

Tekstaranĝo: Erik D'Hondt kaj Paŭl Peeraerts

ISBN; 978 90 71205 77 0

UDK: 82.3.892

NUR: 631

Leĝa depono: D/1997/2924/3

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - BE-2060 Antverpeno

www.retbutiko.be

© 2000 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de „La brulanta kastelo” estas nur nekompleta provversio kaj povas esti libere kopiita.